

Aveno 2010-08-29 Homaj kaj Bestaj Rajtoj

Bonvolu subskribi la **peticion por savi Sakineh** - dankon al Reza. La retejo estas en pluraj lingvoj.

<http://freesakineh.org/>

Peticio de PTROA - Bonvolu subskribi ghin: **Respekti la Bestajn Rajtojn en P.R.Chinio:**

(pluraj lingvoj) <http://www.ptroa.co.il/petition/index.php>

Ĉiujare dekmilionoj da bestoj estas buĉitaj kaj buĉataj en Ĉinujo. Besta pelto estas multe mendata, kaj la ĉinoj liveras. Kio ne estas eksportita ekster Ĉinio, kutime finas sur manĝotelero.

La malfeliĉiga fakto estas, ke la bestoj suferas kruelan torturadon. Ili estas kaptataj en stratoj, kaj dekope kunmetataj en malgrandaj kaĝoj, sen moviĝokapablo. Ili estas tiam ĵetataj kiel senvivaj objektoj de la kamionoj sur la grundon, interpuŝate unu sur la alian kaj sur la ŝtalan kaĝon. Tiuj kaĝoj estas poste supermetataj, kaj la veraj kruelaĵoj komenciĝas. La bestoj estas abrupte tirataj el la kaĝo, kaj ligataj por malhelpi rezistadon. Ili estas iom sensentigataj de frapo sur la kapon, sed ankoraŭ vivas. Se besto estas ne tro peza, la laboristo tenas ĝin per ties postaj kruroj, svingas ĝin en la aeron por frapegi ĝian kapon kontraŭ la grundon. Post kiam la besto estas nevigligita, nova kaj nekomprenebla paŝo en tiu longdaŭra torturado komenciĝas.

La laboristo faras entranĉon en la bestan malantaŭon, kaj poste metode deŝiras la haŭton. Ĉi tiu senhaŭtiga procezo daŭras proksimume minuton, dum kiu la laboristo vole tenas la beston viva, ĉar oni kredas, ke estas pli facile senhaŭtigi la beston dum ĝi estas ankoraŭ varmeta kaj sango fluas tra ĝiaj vejnoj. La torturado ankoraŭ ne finiĝis. La fina paŝo en tiu nekredbla hororo okazas, kiam la besto estas flanken ĵetita kaj malrapide pereas meze de amaso da ĝia mortantaj amikoj, ĉar ĝi ne plu povas elteni la doloron.

En aliaj kazoj, kiam la besta pelto ne estas aprezata (plejparte pri katoj), la bestoj estas metataj en sakon kaj vivaj kuirataj en barelo da bolanta akvo. Ĉi tiu procezo estas malfacilege akceptebla, sed ni kredas, ke ĝi ne estas okazigata pro kruleco, sed pro nescio kaj nekonscio pri bestaj bezonoj. La laboristoj ne pripensas mortigi la beston antaŭ ol ili komencas, kaj ne konscias la bestan suferadon.

Nia sindevontigo estas provizi klerigon. Estas nia morala devo al tiuj bestoj. Se ni fermas niajn okulojn, tio ne ĉesos! (dank al Pawel Fischer (PL), traduko de la peticio de Leo)

Komento de AVE/mw: Kompreneble por vegetaranoj tio estas nur duona afero - ĉar tiu peticio ja ne kontrauas la buĉadon, sed nur la eviteblajn kruelajhojn je tenado, transporto, senfeligo kaj mortigo.

2010-04-27 La Unua Vic-Prezidento de la Ruanda Demokrata Verda Partio, **Andre Kagwa Rwisereka, estis krulele mortigita.** <http://rwandagreendemocrats.org/spip.php?article83>

Jen la komento de la alta Reprezentanto de EU, Catherine Ashton:

http://www.consilium.europa.eu/uedocs/cms_data/docs/pressdata/EN/foraff/115851.pdf

La Europa Verda Partio kondolencis al la familio kaj postulis esploron de la murdo: ... Tiu murdo montras la kreskantan premon flanke de la Prezidento Paul Kagame sur la opozicion. La elekto en Augusto shajnas ighi nek liberaj nek justaj. (Iau Global Greens Update, 2010-07-14)

Aveno 35 - Homaj Rajtoj - 2010-04-27

2010-04-13 **Invado de rusa polico en la oficejon de SEU (Sociala Ekologia Unio) en Samara.**

Tago antaue okazis manifestacioj en 44 rusaj urboj kontraŭ la forhakado pistacho-junipera arbaro en la naturprotektita zono "Granda Utrish" proksime de la Nigra Maro en la regiono de Krasnodar.

La invado okazis sen indiko de reala kauzo, sed pro "krimaj aferoj". Ghi estas plia indiko ke la belaj vortoj de la nuna prezidento pri libera agado de asocioj ne valoras.

Retejo de SEU. <http://www.seu.ru>

Protest-deklaracio de Heidi Hautala, MEP, komitatanino pri Homaj Rajtoj kaj respondeculoj de EVP, Monica Frassoni and Philippe Lamberts de la Frakcio de Europa Verda Partio/ ELA en la EP.

Kontrau eskalado de milito en Afghanio:

Jen ligo al jutjub' al parolo de Verdulo Hans-Christian Stroebele, Berlino, okaze de la kancelierina parolo pri la militara afero en Afghanio. Li estas kontraux tiu militara engaghigho, kaj postulas de la registaro tuj haltigi la ofensivajn agresojn de la NATO, por eviti plian eskaladon de la milito. La ISAF-mandato, lau kiu ili trovighas en Afghanio estas por stabiligado. T.s. armiloj estas uzendaj nur en kazo de rekta atako kontrau la soldatoj au kontrau la civiluloj. Krome li menciis ke plimulto de la germana populacio kontrauas tiun engaghighon. Stroebele estas la sola rekte elektita Verdulo en la germana parlamento.

(de) <http://www.stroebele-online.de> <http://www.youtube.com/user/StroebeleTV>

(intervjuo-teksto, DLF, 2020-04-23) <http://www.stroebele-online.de/show/3523990.html>

(2010-04-26, lau informo de Katrin Schmidberger, lia scienca kunlaborantino.

AVENO 2010-04-18

Karaj geamikoj, **UNIFEM** estas la establo de UN por virinoj. Tiu institucio klopodas subteni la virinojn chie en la mondo kaj provas lukti por iliaj rajtoj kaj plibonigi iliajn vivkondichojn. Vidu www.unifem.org

UNIFEM havas la subtenon de 17 landaj asocioj, kiuj laboras samcelen. En Svislando estas UNIFEM Svislando kun sidejo en Zuriko. Mi vizitis tiun oficejon marde la 13an de aprilo kaj konatighis kun du kunlaborantinoj. Agrabla etoso, efika laboro. UNIFEM Svislando elektas certajn projektojn de UNIFEM kaj helpas konkrete, rekte kaj efike. Povas esti, ke mi per miaj vojaĝoj povos iri surloken kaj vidi tiajn projektojn kaj poste raportu al UNIFEM Svislando. Eble tio okazos unuanfoje en Nepalo, kien mi intencas iri en 2012. Esploranda kunlaboro. Vidu www.unifem.ch

POR KE PLI DA VIRINOJ POVU VIVI DIGNE:

La taskoj estas multnombraj: ekde lukto kontrau ekscizo ghis rajto je edukado.... la laboro estas giganta. Bonvolu pripensi, kiel vi povus subteni la strebadon de UNIFEM Svislando.

Kun varmaj antaŭdankoj. Elkoraj salutoj al chiuj!, Mirejo (2010-04-15)

ICAHD - La Israela Komitato Kontrau Detruado de Domoj

"Counter Rhetoric" - "Kontraustaru al Retoriko".

Broshuro de ICAHD, 2006, aŭtoroj: Emily Schaeffer, Jeff Halper, Jimmy Johnson.

Ĉi tiu utila malgranda libro faras du aferojn. Ĝi defias la retorikon, la perceptojn kaj antaŭ-supozoj rigardante la konflikton en Israelo/Palestino, kaj ĝi malkovras la fundamentan misekvilibron de potenco ĉirkaŭ kiu ĉi tiu retoriko cirkulas.

Estas ambaŭ, kaj utila kiel historia gvidilo kaj kiel ilo por rebati/kontraustari la kutiman malharmoniigan retorikon.

Mendebla - au rekte legebla - je: <http://icahd.org/eng/publications.asp>

(ar, en, il) <http://icahd.org>

Traduko de tiu broshuro en la germanan: eldonita de: Internationaler Versöhnungsbund, Deutscher Zweig

Der israelisch-palästinensische Konflikt: Aufräumen mit gängigen Ansichten durch kritische Betrachtung im Gesamtzusammenhang

Übersetzung: Gabi und Juliane Bieberstein, Anne Korf, Anka Schneider, 2010 Sozio-Publishing, Belm-Vehrte, Osnabrück, **ISBN 978-3-935431-16-3**

Aveno 2010-02-25

Israelaj oficiroj estis punitaj pro bombado kun fosforaj brulbomboj. Dum la Gaza-Milito komence de 2009 ili ordonis pafi granatojn kun blanka fosforo - tre danghera pro la bruligo kaj krome venena - al domo de UN-helporganizajho por rifughintoj. Tio kontrauas la militleghon.

(Ha'aretz 2010-02-01/ taz 2010-02-02, p.10)

4a de marto 2010: La kazo Jukos antau la Europa Kortumo pri Homaj Rajtoj

jen kolekto de la diversaj faktoj kaj historio de Jukos: <http://www.verduloj.org/rusio.htm>

(en, de, fr, ru) <http://www.yukos-echr-claim.com/>

Agado por lingvaj rajtoj: (multaj lingvoj) <http://www.lingvaj-raĵtoj.org/>

Tatjana Zhdanoka estas membro de EP en la frakcio de Verduloj/Regionalistoj (Greens/EFA) - shi kunverkis rilatan libron pri la problemoj de rus-devenaj homoj en Latvio.

http://www.pctvl.lv/index.php?lang=en&mode=opinion&page_id=262

Aveno 2010-02-12

Ni helpu sanghi en Usono:

Aboli la mortpunon en Usono kaj tutmonde:
Enkonduki Esperanton kiel Helplingvon tutmonde:

Mi rezignas denove skribi la detalajn argumentojn, sed nun - dank al Obama - eblas voĉdoni; jen la plej urgha agado:
https://www.change.org/ideas/view/abolish_the_death_penalty

Kaj serchu Esperanto - kaj vi trovos i.a.:
http://education.change.org/actions/view/help_solve_the_worlds_language_problem

Malfermi kavon por imposto-fraudantoj kaj mon-lavado:

"Svislando devos kooperi pri intershangho de fiskaj informoj kun la EU-registaroj, se ghi volos senlime atingi la merkaton de la malnova kontinento". Temis nek pri auspicio nek pri minaco... Ghi estis simpla konstato, tamen grandvalora se oni konsideras ke ghi venas de la Financministro de la Sviza Konfederacio.

Uganda punas samseksemulojn - Bonvolu subskribi:

Mi subskribis la sekvan peticion de AVAAZ.org al la registaro de Ugando por aboli la leghon kontraŭ samseksemuloj. Ghi minacas per priso kaj eĉ per mortpuno. Bonvolu ankaŭ subskribi - helpu al Frank:
http://www.avaz.org/en/uganda_for_tolerance_1/98.php?CLICK_TF_TRACK

Jen kelkaj rilataj ligoj: African letter to Ugandan President to throw out Anti-homosexual bill:
<http://www.africafiles.org/article.asp?ID=22761>

Ugandan church leader brands anti-gay bill 'genocide':
<http://www.guardian.co.uk/katine/2009/dec/04/gideon-byamugisha-homosexuality-bill>

The U.S. Christian Right and the Attack on Gays in Africa:
<http://www.publiceye.org/magazine/v24n4/us-christian-right-attack-on-gays-in-africa.html>

Human Rights Impact Assessment of Uganda's Anti-homosexuality Bill
By Sylvia Tamale, The Dean of Law at Uganda's Makerere University:
<http://www.zeleza.com/blogging/african-affairs/human-rights-impact-assessment-ugandas-anti-homosexuality-bill-sylvia-tamal>

Aveno 35 - 2010-01-24 / Religioj kaj Paco

Kvankam ne religia, tamen ATTAC ankaŭ penas pri sociala justeco: (de,en,es,fr): <http://www.attac.org>

(Tut)monda Etiko:

Fonduso Weltethos, laŭ Prof-o Hans Küng, ofertas materialojn por enkonduki tiun ideon en la lernejojn kun la temoj: religioj, ekonomio, politiko, ĉiutaga kunvivado. (de, en, es, fr) <http://weltethos.org>

Kaj same interesa - eĉ pli malnova organizajho: Religioj por la Paco
(de - kun ligo(j)) <http://www.religionsforpeace.de>

La parlamento de la mond-religioj ĵus kunsidis en Melbourne: i.a. parolis indighenoj favore al respekti la mondan klimaton. (en) <http://www.parliamentofreligions.org/>

Kaj simile - sed sole kristane - postulante justan socion tutmonde: (de, en, fr) <http://www.kairoseuropa.de>

Senperforta Agado - Senperforta solvado da konfliktoj: (de, en) <http://www.wfga.de/>

Aveno 35 - 2010-01-12

La **Usona Leĝo Instituto (ALI) oficiale retiris la mortopunon** de ĝia Modela Puno-leĝaro post konkludo, ke estas senespere mankohava, multaj Usonaj ĵurnalaj kaj revuaj ĉefartikoloj aplaudis la agon de ALI, kaj alvokis abolicii la mortopunon. Inter ili estas la St. Louis Today, The Sacramento Bee, The Christian Science Monitor, The New York Times kaj The Nation kontribuanta verkisto Laura Flandrio: "Mortopuno-subtenantoj agnoskas sian malvenkon".

La verkistoj agnoskas, ke sen la subteno de ALI - la eminenta U.S. sendependa laŭleĝa organizaĵo konsistanta el 4.000 advokatoj, juĝistoj kaj leĝo-profesoroj kiu produktas sciencan kontribuon por plibonigi la leĝon - sxtata pravigo daurigi la mortopunon malfortiĝas. 2010-01-12, <http://www.ncadp.org/>

